

informilo por interlingvistoj

ipi

26-a jaro (tria serio) | n-ro 102 (3/2017) | ISSN 1385-2191

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
kaj Esperantic Studies Foundation

Enhavo

1	Antaŭparolo	2
2	Lastatempaj publikigaĵoj	2
	Libroj	2
	Artikoloj	2
	Ĉapitroj	3
	Doktora disertacio	3
3	Malferma Tago ĉe Universala Esperanto-Asocio, 25 novembro 2017	3
4	Enhavtabelo: Prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato, Seulo, 2017	4
5	Alvoko por referaĵoj: 3-a Internacia Konferenco pri Ekonomia, Komerca, Financa kaj Institucia Tradukado, Universitato de Alicante, Hispanio, 27-29 junio 2018.	4
6	CED: Protokolo de la publika kunsido dum la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, Seulo, 27 julio 2017	5
7	D-ro Gobbo: Letero al CED-membroj, de la Universitato de Amsterdamo	7
8	Lingvoj kaj Landlimoj: Universitato de Bristol, 26-27 marto 2018	9
9	Kanalo YouTube prezentas ĉiujn referaĵojn de la Somera Lernejo pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado	9
10	Kontestataj Lingvoj en la Malnova Mondo (CLOW 3)	9
11	Resumo: Metalingva konscio kaj Esperanto-instruado	10
12	Stipendio Buchanan por Doktoriga Instruposteno en Esperanto / Planlingvoj / Lingvoplanado	11
13	Language Problems and Language Planning: Aktualaj numeroj	12
	Vol. 40, no. 3/2016	12
	Vol. 41, no. 1/2017	13
14	La nova Tekstaro.com donas pli da Zamenhof, novajn kapablojn, kaj plian rapidecon!	13
15	Lastatempaj publikigaĵoj de Bernhard Tuidar (Direktoro, Kolekto por Planlingvoj, Aŭstria Nacia Biblioteko)	14
16	Rekoncepti la mondon pere de lingvoj: La rolo de Esperanto en la moderna japana historio	15
17	20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj, Poznan, Pollando	16
18	Nuna stato kaj evoluo de la instruado de Esperanto kiel internacia lingvo en la tuta mondo: Universitata Simpozio. Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj, Seulo, Koreio, julio 2017.	17
19	AIS San Marino sesiiis en Varsovio, 10-15 septembro 2017	17
20	Pli ol 70 Esperanto- periodaĵoj nun plene traserĉeblaj	18

1. Antaŭparolo

La nova numero de *Informilo por Interlingvistoj* kovras grandan diversecon de novaj eldonaĵoj, estontaj aranĝoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj informoj. Plejparte, ĝia enhavo similas al la enhavo de ĝia anglalingva eldono, *Information for Interlinguistis*. Se vi ŝatus regule ricevi unu aŭ ambaŭ el tiuj ĉi eldonaĵoj kaj ne jam troviĝas en nia dissendolisto, sciigu nin. Kiam aperos nova numero, ni informos vin pri tio, sendante al vi ligilon al la koncerna paĝo en la retejo de ESF (esperantic.org).

Kaj nepre sendu al ni viajn novaĵojn (pri lastatempaj publikigaĵoj, konferencoj, estonta aranĝoj ktp.)!

Humphrey Tonkin
Yevgeniya Amis

2. Lastatempaj publikigaĵoj

Libroj

- Asya Pereltsvaig. *Languages of the World: An Introduction*. 2nd Edition. Cambridge: Cambridge University Press, 2017. viii+390pp. <https://www.amazon.com/Languages-World-Introduction-Asya-Pereltsvaig/dp/1316621960>
- Michele Gazzola k Bengt-Arne Wickström. *The Economics of Language Policy*. Cambridge, MA: MIT Press, 2016. 520pp. <https://mitpress.mit.edu/books/economics-language-policy>
- Humphrey Tonkin k Victor Sadler. *Rekomendata terminaro Esperanto-angla kaj angla-Esperanto por tradukantoj de oficialaj dokumentoj kaj gazetaraj komunikoj / Recommended Esperanto-English and English-Esperanto Terminology for Translators of Official Documents and Press Releases*. New edition. New York: Mondial, 2017. 103pp.
- Ivo Lapenna. *Elektitaj tekstoj pri internacia juro*. Durdevac, 2017. 364pp.
- Roman Dobrzynski. *Zamenhof en Varsovio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2017. 160pp.
- Fernando Pita k Guilherme Fians, red. *O Esperanto Além da Língua*. Porto Velho, Brazilo: Temática. 2017.

Artikoloj

- Ulrich Lins, "Die Esperanto-Sammlung der Staatsbibliothek zu Berlin. Bibliotheksmagazin 2/2017, 82-88. http://staatsbibliothek-berlin.de/fileadmin/user_upload/zentrale_Seiten/ueber_uns/pdf/Bibliotheksmagazin/Bibliotheksmagazin_2017_2.pdf
- Torsten Templin, Andrea Seidl, Bengt-Arne Wickström k Gustav Feichtinger. Optimal language policy for the preservation of a minority language. *Mathematical Social Sciences* 81 (2016) 8-21.
- Bengt-Arne Wickström, English-only language policy: The road to provincialism? *Acta Universitatis Sapientiae, European and Regional Studies*, 9/1 (2016)

- Giridhar Rao. 2014. What Esperanto Offers Language Teachers. *Language and Language Teaching*. Vol. 3 no. 1. Issue 5 (January): 1-5. <http://apfstatic.s3.ap-south-1.amazonaws.com/s3fs-public/What%20Esperanto%20Offers%20Language%20Teachers.pdf>
- Humphrey Tonkin. Marjorie Boulton 1924-2017: La gramatik' de grandanimo. *Esperanto* 110 (2017)/10: 210-211
- Norica-Luminița Butnaru. Means of preserving intentionality and functionality in constructed language translation analyses: A study on Kálmán Kalocsay's Esperanto poem "Somernokto". *Interstudia* 19 (2016): 91-100.

Ĉapitroj

- Bengt-Arne Wickström. Language Rights: A Welfare-Economics Approach. In V. Ginsburgh & Schlomo Weber, eds. *The Palgrave Handbook of Economics and Language*. London: Palgrave Macmillan, 2016), 659-688.
- Humphrey Tonkin. Naturalizing a Planned Language: Esperanto and the Promotion of Linguistic Diversity. In Maryam Borjian, ed. *Language and Globalization: An Autoethnographic Approach*. New York & London: Routledge, 2017. 144-157.
- Norica-Luminița Butnaru. Transplanting pragmatic orientations within conlang translations: A study on C. Brontë's *Jane Eyre*, translated into Esperanto by H.J.Bulthuis. In Iulian Boldea, ed. *Discourse as a Form of Multiculturalism in Literature and Communication*. Tirgu Mures, Romania: Arhipelag XXI Press, 2015. 727-738.
- Angela Tellier and Karen Roehr-Brackin. Raising Children's Metalinguistic Awareness to Enhance Classroom Second Language Learning. In María del Pilar García Mayo, ed. *Learning Foreign Languages in Primary School: Research Insights*. Clevedon: Multilingual Matters, 2017.

Doktora disertacio

- Norica-Luminița Butnaru. La marginea postulatelor traducerii: explorarea posibilității traducerii din și în limbi construite (On the Fringe of Translation Postulates: Exploring the Possibility of Translating from and into Constructed Languages). Alexandru Ioan Cuza University, Iași, Romania. 2017 (in Romanian). Summary at [http://mail.lit.uaic.ro/scoala_doctorala/DOCUMENTE/CV%20drd%201/RO_Rezumat%20\(N.%20Butnaru.pdf](http://mail.lit.uaic.ro/scoala_doctorala/DOCUMENTE/CV%20drd%201/RO_Rezumat%20(N.%20Butnaru.pdf)

3. Malferma Tago ĉe Universala Esperanto-Asocio, 25 novembro 2017

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas por la 47-a fojo al la Malferma Tago [https://eo.wikipedia.org/wiki/Malferma_Tago_de_UEA], kiu okazos sabaton la 25-an de novembro 2017. Tuj poste, dimanĉon la 26-an de novembro, okazos seminario pri informado. La 48-a Malferma Tago estos la 28-a de aprilo 2018.

La 47-a Malferma Tago estos pontoligo inter la finiĝanta Zamenhof-Jaro kaj la komenciĝanta Jaro de la Esperanta Kulturo. Niaj ĉefprelegantoj ĉi-foje estos Roman Dobrzyński (Zamenhof en Varsovio),

Spomenka Ŝtimec (Renkonte al la Jaro de la Esperanta Kulturo - En slava fokuso: Vasilij Eroŝenko) kaj Amri Wandel (Kosmo kaj ni: novaj perspektivoj de vivo ekstertera).

Por pliaj detaloj bonvolu sekvi la Facebook-okazaĵon
<http://www.facebook.com/events/358331674607828>

Kiel kutime, en la programo estos ankaŭ prezentado de libroservaj novaĵoj; krome, kafo kaj teo estos senpagaj kaj varmaj la tutan tagon. Aldone al specialaj ofertoj, la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la Libroservo.

La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo ambaŭtage ĉe Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Roterdamo, Nederlando.

4. Enhavtabelo: Internacia Kongresa Universitato, Seulo, 2017

Amri Wandel, ed. *Internacia Kongresa Universitato, 70-a Sesio, Seulo, Suda Koreio, 22-29 julio 2017.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. 2017. 189pp.

- Duncan Charters kaj Cecilia Lee. Interkultura kompetento: Kiel plej efike akiri ĝin?
- Ruben Fernandez. En la radikojn de anglalingva tutmondiĝo: Pra-kolonia lingvopolitiko en Havajo
- Javier Alcalde. Solidareca agado pri migrantoj kaj rifuĝantoj en Eŭropa Unio
- Macej Zieba. "Dek diagramoj de la instruo de saĝuloj" de Toegye Yi Hwang
- Puramo Chong. Sanprizorgado de orienta medicino, interrilato inter menso kaj korpo
- Humphrey Tonkin. Clarence Bicknell, [poeto, pionira esperantisto, sciencisto
- Orlando Raola. Uzo de masa spektrometrio por studado de praaj klimataj ŝanĝiĝoj
- Jo Haazen. La ekesto, la historio kaj la evoluo de la kariljona arto en la mondo
- François Lo Jacomo. Primnombroj.

5. Alvoko por referaĵoj: 3-a Internacia Konferenco pri Ekonomia, Komerca, Financa kaj Institucia Tradukado, Universitato de Alicante, Hispanio, 27-29 junio 2018.

Retejo: <https://dti.ua.es/en/tradeco/iii-icebfit/iii-international-conference-on-economic-business-financial-and-institutional-translation.html>

Ni invitas al prezento de proponoj pri referaĵoj en la hispana, franca kaj angla, kiuj traktas la jenajn kampojn aldone al specialigita fako (kontado, financo, merkatumo, logistiko, transportado, reklamado, vendoj, asekuro, makroekonomiko, makrofinanco, monpolitiko, turismo, entreprena regado, mastrumado, nemoveblaĵoj, entreprenaj retejoj, ktp.):

- Terminologiaj problemoj kaj tradukada praktiko
- Kreado de terminologiaj rimedoj
- Ĝenroj, tekstaj taksonomioj kaj kontrasta analizado
- Profesia sperto

- IT kaj utiligo de tradukaj rimedoj
- Traduka trejnado

Akceptitaj referaĵoj unue aperos en la Institucia Deponejo de la Universitato de Alicante (<https://rua.ua.es/dspace/?locale=en>) libroforme kaj kun ISBN, kaj selekto aperos en la internacia revuo *Onomázein* (http://onomazein.letras.uc.cl/01_Presentacion/Overview.html).

Referaĵojn oni submetu elektronike laŭ la reta submeta sistemo (<https://cvnet.cpd.ua.es/uaCuestionarios/preguntas.aspx?idcuestionario=8650&idioma=en>).

- Proponoj (resumoj) estu submetitaj en la prezentolingvo (200 vortoj).
- Aŭtorojn kiuj interesiĝas prezenti esploran referaĵon oni invitas sendi resumon (400 vortoj) kiu klarigu la esploran demandon, celojn, teorion kaj metodikan kadron, kaj provizorajn rezultojn.
- Oni rajtas submeti maksimume du proponojn, almenaŭ unu el kiuj devas esti kunaŭtora.
- La jenaj parolantoj jam konfirmis sian partoprenon: Chris Durban (financa tradukisto), Dima El Hussein (Université Française d'Egypte), Defeng Li (University of Macau), José Mateo (Instituto Universitario de Lenguas Modernas)
- Resumojn oni sendu ĝis 31a de oktobro. Oni respondos ĝis 15a de decembro. Limdato por aliĝo al la konferenco: 31a de majo 2018.
- Kontaktulo: Daniel Gallego Hernández (daniel.gallego@ua.es)

6. CED: Protokolo de la publika kunsido dum la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, Seulo, 27 julio 2017

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI MONDAJ LINGVAJ PROBLEMOJ (CED). Publika kunsido dum la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, Seulo, 27 julio 2017. Prezido: Humphrey Tonkin, direktoro

Ĉeestis la kunsidon 35 personoj.

1. Bonvenigo. D-ro Tonkin bonvenigis la partoprenantojn. Li atentigis ilin pri granda perdo, kiun CED kaj la Esperanto-movado suferis dum la pasinta jaro, nome la forpaso de d-ro Detlev Blanke, unu el la kolonoj de la interlingvistiko kaj esperantologio kaj gravega kontribuanto al la laboro de CED. Prof. Christer Kiselman aldonis siajn komentojn pri la giganta laboro de d-ro Blanke. Sekvis momento de silento memore al d-ro Blanke.

La esperantologio perdis ankaŭ aliajn notindajn kontribuantojn, inter ili Paul Gubbins, Zbigniew Galor kaj Reinhard Haupenthal.

2. Raportoj pri agado dum la pasinta jaro, planoj por la venonta

2.1. Esperantologia Konferenco. Kiselman raportis pri la Esperantologia Konferenco, kiu okazis pli frue en la sama tago. Organizis kaj prezidis d-ro Orlando Raola, kaj prezentiĝis referaĵoj de ok kontribuantoj. Temis pri la kvardeka konferenco en la serio, kiu komenciĝis antaŭ kvardeko da jaroj sub gvido de d-ro Blanke.

2.2. Novjorka simpozio. Tonkin raportis pri la ĉi-jara simpozio, kiu okazis en majo tra du tagoj kaj en ĉeesto de pli ol cent funkciuloj de Unuiĝintaj Nacioj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, diplomatoj, kaj universitataj fakuloj. La temo ĉi-jara traktis la lingvan dimension de la Celoj por Daŭripova Evoluigo en rilato kun la plej vundeblaj homgrupoj (ekzemple rifuĝintoj). La aranĝo realiĝis dank'al subteno de la Centro por Aplika Lingvistiko (Vaŝintono) kaj Esperantic Studies Foundation.

2.3. Ipl kaj Ifl (*Informilo por Interlingvistoj, Information for Interlinguists*). Ipl raportadas pri novaj evoluoj en interlingvistiko (novaĵoj pri konferencoj, novaj eldonaĵoj ktp). Ĝi estis redaktita de D. Blanke tra entute 99 numeroj. La 100-a numero estas indekso de la antaŭaj 99 numeroj kaj lastatempe aperis. Sub aŭspicio de ESF, CED daŭrigos la aperigon de Ipl, kaj ESF aldonos novan serion, Ifl, anglalingvan version de Ipl por fakuloj kiuj ne scipovas Esperanton.

2.4. LPLP. LPLP aperadas regule trifoje jare. Tiu bone konata revuo pri lingvoplanado kaj lingvopolitiko estas eldonata de CED pere de la eldonejo Benjamins, en Amsterdamo. Ĝis la fino de la nuna jaro redaktas ĝin Timothy Reagan. CED baldaŭ anoncos novan redaktoron ekde januaro 2018. Tonkin atentigas la ĉeestantojn, ke oni daŭre serĉas altnivelan materialon pri interlingvistiko.

2.5. *Studies in World Language Problems*. Tiun ĉi libroserion redaktas Tonkin por la eldonejo Benjamins, kun helpo de elstara redakcia komitato.

2.6. MLA. Ĝis la fino de la nuna jaro kompilas materialon por la granda bibliografio de Modern Language Association d-ro Wim Jansen, kiu respondecas pri la interlingvistika kaj esperantologia partoj de tiu ĉi grandega reta bibliografio, kun kiu CED kunlaboras jam kvardekon da jaroj. Ni nun serĉas novan kunlaboranton.

2.7. CED-Fonduso. De ESF, CED ricevas subvencion de \$7000 jare, por utiligo por malgrandaj subvencioj al fakuloj por helpi ilin pri specifaj esplorprojektoj kaj simila agado. Prizorgas ĝin komisiono: Jesper Jacobsen (Francio), Velimir Piskorec (Kroatio), Angela Tellier (Britio), plus Humphrey Tonkin, kunordiganto. Inter lastatempaj projektoj estas:

Itala Esperanto-Federacio (Davide Astori), publikigo de la aktoj de simpozio pri minoritataj lingvoj (inkl. Esperanton), Frascati, Italio, aŭgusto 2016. Antaŭvidata kompletigo antaŭ la fino de 2017.

- Seminario pri lingvoplanado kaj lingvopolitiko, Universitato de Kostariko, kontribuo al la buĝeto, ĉefe por helpi pri la vojaĝkostoj de la tri profesoroj (Gazzola, Gobbo, Johnson)
- Guilherme Fians (Britio/Brazilo), Univ. de Manĉestro, etnografia enketado en la UK, Seulo
- Javier Alcalde (Hispanio), vizito al Kanado por intervjuoj kun konata esperantisto-anarkiisto Eduardo Vivancos, civilmilita veterano, prepare al libro
- Krunoslav Puškar (Kroatio), por prezenti referaĵon en la interlingvistika simpozio, Poznan
- Ariadna García Gutiérrez (Kubo, prezidanto de la Terminologia Komisiono de UEA), partopreno en la Terminologia Somera Kurso en Köln, Germanio, 10-14 julio 2017 (kosto dividita kun UEA)
- D-ro Alcalde mallonge raportis al la kunsido pri sia projekto.

2.8. Nitobe-Simpozio. Tiuj simpozioj estas organizataj de ESF en kunlaboro kun CED ĉiun trian aŭ kvaran jaron. Estas antaŭvidite, ke la venonta okazos en Lisbono kunlige kun la venontjara Universala Kongreso.

3. Esperanto en universitatoj. Tonkin petis raportojn de la ĉeestantoj pri universitata agado. D-ro Giridhar Rao raportis pri sia kurso en la Universitato Azim Premji, Barato – institucio fondita por antaŭenigi la kreadon de humana konscio. D-ro Alcalde informis pri novaj iniciatoj ĉe la Universitato de Seviljo, Hispanio. S-ro Keefe atentigis, ke la kurso en la Universitato de Nankino ĉesis kiam li forlasis tiun urbon – situacio ne malofta en Ĉinio, kie starigo de kursoj ne tiel malfacilas kiel trovo de kompetentaj homoj por gvidi la kursojn. Tiun punkton emfazis s-ro Sasaki Teruhiro (Japanio) kiu nun instruas Esperanton en la Universitato Zaozhuang sed serĉas posteulon. S-ro Trezoro aparte substrekis, ke la ideala kombino estas homo kapabla instrui la anglan kaj Esperanton ĉar daŭre estas bezonataj bonaj instruantoj de la angla. Tonkin raportis mallonge pri la Universitato Adam Mickiewicz en Poznan, Pollando, kie baldaŭ komencos sian studadon nova trijara grupo de studentoj pri interlingvistiko kaj Esperantologio.

4. Rilatoj kun ESF. Kiel supre notite, la rilatoj inter CED kaj ESF restas proksimaj kaj utilaj al ambaŭ organizaĵoj.

5. Direktoreco. Tonkin klarigis, ke li jam antaŭ iom da tempo anoncis sian deziron ekŝiĝi el la direktoreco de CED, por sekurigi fluan transiron de la Centro en novajn manojn. Li pretas intertempe daŭrigi la laboron.

6. Terminologio. Ne venis aparta raporto.

7. Bibliotekoj. La Ĝenerala Direktoro de UEA raportis pri nova bibliografia kunlaboro inter la Aŭstralia Biblioteko kaj la Biblioteko Hodler.

8. Estontaj prioritatoj. Kion CED mem faru; kion ĝi povas fari por helpi aliajn fakulojn, instituciojn ktp?

Menciitaj estis la neceso pligrandigi rete alireblajn arkivojn de Esperanto-gazetoj, kaj la graveco trovi homojn por samtempe instrui la anglan kaj Esperanton en ĉinaj universitatoj (vidu supre), kiel plej bona ebleco por enkonduki Esperanton pli vaste en Ĉinio.

7. D-ro Gobbo: Letero al CED-membroj, de la Universitato de Amsterdamo

Estimataj CED-membroj, karaj gekongresanoj, bedaŭrinde mi ne povas esti fizike kun vi ĉe la UK en Seulo, do mi sendas al vi mallongan raporton pri la agado kiun mi estras per la speciala katedro en la Universitato de Amsterdamo. Mi priskribas nun ankaŭ la agadon kiu koncernas la katedreton en la Universitato de Torino. La periodo estas la akademia jaro 2016-2017, alivorte ekde la fino de la antaŭa UK en Nitro ĝis nun. La kurso de Interlingvistiko iĝas pli kaj pli populara inter la gestudentoj, kiuj venas de multaj landoj danke al interŝanĝaj projektoj kiel ekzemple Erasmus. La kurso de Esperanto en Amsterdamo estas sufiĉe populara, kaj NEJ-estraranoj venis prezenti la asocion, sed ĝis nun neniu Amsterdama studento daŭris sian esperantistecon post la ekzameniĝo, almenaŭ miascie. Male, kelkaj studentoj en Torino partoprenas la vivon de la loka klubo kaj vizitas la italan kongreson post ekzameniĝo, ankaŭ danke al la aktiva kunlaboro kun Nicola Ruggiero, kiu nun studas lingvosciencan en Torino kaj brile trapasis la Torinan ekzamenon pri planlingvistiko.

En Amsterdamo, nuntempe mi sekvas tri tezojn kiel relatoro. Du koncernas Interlingvistikon. La unua pritraktas la uzon de planlingvoj ĉe nuntempaj artistoj, dum la dua la feminisman planlingvon Ladaanon kaj la kialojn de ĝia malsukceso. Tria tezo koncernas Esperantologion: la temo estas komparo inter tradukoj en Esperanto kaj en la angla de fama poemo de la antikva greka poetino Sapfo. Kiel mezuri la kvaliton de la tradukoj en la du lingvoj? Ŝajnas, ke la traduko en Esperanto estas pli fida ol tiu en la angla. Rezultoj de ĉiuj tezoj venos en aŭtuno. La kunlaboro kun Esperanto Nederland estas fruktodona: regule mi prezentas Esperanton (en Esperanto mem) dum la plej granda lingvofestivalo de la lando, nomata Drongo. La reagoj estas ofte tre pozitivaj. Krome, mi instruis superan kurson de Esperanto en la studsemajnfino organizita de la asocio mem kaj laŭokaze prelegas. Fine, ĉiujare diversaj lernejaninoj petas helpon por verki diplomlaboraĵojn en la nederlanda pri Esperanto. Tiun ĉi jaron venis interesaj proponoj tiurilate.

Eksteraj rilatoj de la katedrulo estis multaj kaj buntaj en 2017, ĉar temas pri la Zamenhofa Jaro, kaj pro tio ofte ĵurnalistoj petas informojn aŭ eĉ intervjuojn. Mi mencias nur la du plej gravajn: informpeto de la usona *The New Yorker*, intervjuo de la itala *La Stampa*. Menciindas ankaŭ du akademiaj kunlaboroj. Unue, la Universitato de Amsterdamo helpis al Guilherme Moreira Fians, brazila esploristo en Manĉestro, veni en la kontinentan Eŭropon por fari laborkampon rilate al lia antropologia esplorado pri la uzo de Esperanto en laborlokoj. Due, ekstarigis Erasmus-Plusinterŝanĝprogramo inter Amsterdamo kaj Parmo: printempe prof-ro Davide Astori venis doni tri gastlecionojn al miaj gestudentoj, kaj vintre mi faros la samon en Parmo.

Ene de la Movado, krom la jam pritraktita kunlaborado kun Esperanto Nederland, estas kunlaboro kun la Itala Esperanto-Federacio: fakte, en ties revuo *l'esperanto*, aperas itallingva versio de la artikolserio pri interlingvistiko, jam publikigita esperantlingve sur la paĝoj de *Revuo Esperanto*. Fine, pro konferenco pri minorigitaj lingvoj kie mi prelegis pri la sociolingvistikaj trajtoj de la esperantistaro, ekstarigis okazo prelegi pri la aktualeco de la Zamenhofa flozofio en Barcelono, laŭ invito de la Kataluna Esperanto-Asocio. Mi partoprenis la informbudon dum Sankta Georgo, kie centoj da homoj promenas vidante la ekziston de nia vivanta lingvo, kaj kelkaj partoprenis fulmokuson, estrita de Victor Solé. Mi helpis lin tiurilate.

La rezultoj de miaj esploroj pri Interlingvistiko kaj Esperantologio ĉi-jare estis publikigitaj en Esperanto, la angla kaj la itala en diversaj publikaĵoj kaj konferencoj. Mi mencias nur unu, la artikolon en la prestiĝa fakrevuo *Language Sciences*, kiu pritraktas la demandon ĉu planlingvaj estas malpli kompleksaj ol la aliaj (mallonge, la respondo estas: morfologie ili estas pli regulaj, aparte Esperanto, sed tio ne estas aparta garantio pri kompleta malkomplekseco). Parte la esplorado-agado estas ligata al EU-projekto MIMÉ (Movebleco kaj Inkluziveco en Multlingva Eŭropo). Baldaŭ mi instruos interlingvistikajn temojn en la somera doktora kursaro en Kostariko organizita interalie de d-ro Michele Gazzola.

Fine, karaj geaŭskultantoj, se vi ne ankoraŭ tiel faris, konsideru la eblecon aboni la senpagan bultenon *La Amsterdama Katedro*. Mi tion redaktas por interesatoj kiuj volas resti informitaj pri la disvolviĝo de la agado en Amsterdamo. Temas pri mallonga PDF-dosiero kiun mi sendas, verdire ne tro regule, al ĉiuj Esperantoparolantoj. Por aboni sufcas sendi al mi retmesaĝon al F.Gobbo@uva.nl kun atentigo pri tio en la teksto.

Kun miaj plej bonaj salutoj, Prof. dr. Federico Gobbo ACLC – Amsterdam Research Center in Language and Communication Universiteit van Amsterdam Spuistraat 210 kmr 6.30, NL-1012VT Amsterdam e-mail F.Gobbo@uva.nl web

8. Lingvoj kaj Landlimoj: Universitato de Bristol, 26-27 marto 2018

Tiu ĉi konferenco pritraktos tri esencajn demandojn:

1. Kio konsistigas “limon” en la kompreno de socilingvistikaj esplorantoj? Kiujn lingvajn praktikojn uzas landlimanoj?
2. Kiel socilingvistoj, kion ni povas lerni per multdisciplinaj aliroj al landlimaj studoj? Kiujn perspektivojn prezentas novaj eltrovoj en geografio, sociologio, historio, antropologio, politikologio kaj kulturaj studoj?
3. Kiel diversaj socilingvistikaj metodikaj kadroj (kvalitaj, kvantaj, miksaj) traktas landlimajn scenarojn?

Jam akceptis la inviton ĉefprelegi Brigitta Busch (Univ. de Vieno), Carmen Llamas (Univ. de York), Clare Mar-Molinero (Univ. de Southampton).

Oni invitas kontribuojn de fakuloj el diversaj disciplinaj kampoj kies esploroj traktas la rolon de lingvoj rilate al landlimoj, moviĝo, migrado kaj/aŭ spaco.

Resumojn (maksimume 300-vortajn, anglalingvajn) oni submetu pere de la portalo Linguist List EasyAbs: <http://linguistlist.org/easyabs/langbord2018>. Limdato: 31a de oktobro 2017. Por pliaj informoj, kontaktu James Hawkey: james.hawkey@bristol.ac.uk.

9. Kanalo YouTube prezentas ĉiujn referaĵojn de la Somera Lernejo pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado

Estis starigita kanalo YouTube kie troveblas ĉiuj prezentoj kaj referaĵoj de la Somera Lernejo pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado (LPLPE17): <https://www.youtube.com/channel/UCZ1gZRRoYvwHQDdLNT1uqUA>.

10. Kontestataj Lingvoj en la Malnova Mondo (CLOW 3)

La Tria Konferenco pri Kontestataj Lingvoj en la Malnova Mondo (CLOW 3) okazos en la Universitato de Amsterdamo la 3-an kaj 4-an de majo, 2018. Antaŭaj konferencoj okazis en Bangor (2013) kaj Torino (2016). La konferencon kunorganizas: Federico Gobbo (Univ. de Amsterdam), Mauro Tosco (Univ. de Torino), Marco Tamburelli (Univ. de Bangor). La labortlingvo de la konferenco estos la angla.

CLOW3 kunvenigos lingvistojn, politikologojn, juristojn, verkistojn, aktivistojn kaj aliajn fakulojn kiuj pritraktas la aktualan statuson kaj estontajn perspektivojn de “kontestataj lingvoj” laŭ la konceptoj de Nic Craith (2006).

Oni proponas partoprenon en du formoj:

- 30-minutaj buŝaj prezentoj pri esploroj (20-minuta parolado, 10-minuta demandoperiodo).
- Afiŝoj kiuj prezentas esplorojn.

Profesoroj, doktoriĝantoj, postdiplomaj studentoj kaj sendependaj esploristoj estas invitiataj proponi resumojn (ĉ. 500 vortoj) pri (sed ne limigitaj al) la jenaj temoj:

- kazostudoj pri statusa, korpusa kaj akira planado de kiu ajn kontestata lingvo de Eŭropo;
- komparo inter la lingvopolitikaj kaj -planadaj situacioj de du (aŭ pli ol du) kontestataj lingvoj en Eŭropo;
- sintenoj de parolantoj rilate specifajn kontestatajn lingvojn en Eŭropo, kun speciala atento al la teorio kaj praktiko de “nov-parolantoj”;
- registaraj sintenoj pri specifaj kontestataj lingvoj en Eŭropo, kun speciala atento al la distanco inter malfermaj politiko kaj planado unuflanke kaj “kaŝitaj tagordoj” aliflanke;
- la efiko de lokaj leĝoj kaj/aŭ lokaj elpaŝoj ĉe la statuso aŭ sinteno de kontestataj lingvoj en Eŭropo, rilate ilian tujan videblon kaj perspektivajn celojn, nome garantiadon de ilia intergeneracia transdono;
- ekonomia analizo de nuna kaj estonta lingvopolitiko rilate difinitan kontestatan lingvon en Eŭropo;
- Demandoj de Abstand kaj Ausbau rilate al unu aŭ pli da kontestataj lingvoj de Eŭropo.

Pliaj informoj: <http://www.multilingualism.humanities.uva.nl/clow3/>.

Resumojn oni liveru ĝis 15a de decembro, 2017, per EasyChair: [easychair.org/conferences/?conf=clow3](https://www.easychair.org/conferences/?conf=clow3).

Federico Gobbo
 Universiteit van Amsterdam
 Spuistraat 134, kmr 630
 1012 VT Amsterdam, Nederlands
<http://uva.nl/profile/f.gobbo>
 +31 20 525 4884

11. Resumo: Metalingva konscio kaj Esperanto-instruado

Tellier A. k Roehr-Brackin, K. (2017). Raising children’s metalinguistic awareness to enhance classroom second language learning. En García Mayo, M. del P (red.), *Learning Foreign Languages in Primary School: Research Insights*. Bristol: Multilingual Matters. pp. 22-48.

Anglaj bazlernejoj tipe proponas nur unu aŭ du horojn da fremdlingva instruado semajne. Ekzistantaj esploroj indikas ke en lernkuntekstoj kie enigo estas minimuma, atingoj de junaj infanoj estas malpli altaj kompare kun tiuj de pli aĝaj infanoj kaj plenkreskuloj; eble pro tio ke junaj infanoj ankoraŭ ne havas la necesan kognan maturecon por utiligi eksplicitajn lernprocesojn, lige al metalingva konscio. Se eblus plibonigi ĉe infanoj la nivelon de metalingva konscio, sekve la kapablon por eksplicita lernado, tiuj eble povus tiri pli bonan profiton el la malmulta fremdlingva instruado nuntempe ricevita.

Ĉi tiu studo rigardis al la eblaj efikoj sur la evoluo de metalingva konscio, kaj la sekvaj atingoj en lernado de la franca lingvo, de anglaj bazlernejanoj 8-9-jaraĝaj kiuj ricevis instruadon en malsamaj 'komencingoj' kun aŭ sen formfokusiga elemento.

La infanoj (N = 178) estis elmontritaj al malsamaj komencingvoj dum lerneja duonjaro. La grupo kiu ricevis instruadon en la konstruita lingvo Esperanto plus dediĉita formfokusiga elemento (Grupo E+) estis komparita kun tri aliaj grupoj, kiuj ricevis instruadon en Esperanto, la germana, kaj la itala, respektive, ĉiuj sen formfokusiga elemento. Ĉiuj infanoj sekvis la saman programon en la franca (kun fokuso sur formo) dum la dua duono de la lerneja jaro. Oni taksis la kapablojn de la infanoj per testoj de lingvolerna kapablo, de metalingva konscio, de atingoj en la franca, kaj pri sintenoj rilate al lingvolernado.

Evidentiĝis tri ĉefaj eltrovoj. Unue, ricevo de gvidita form-fokusigaj agadoj en aĝtaŭga 'komencingva' programo celanta ĉiujn kvar kapablojn povas havi bonan efikon sur la evoluo de metalingva konscio ĉe infanoj. Due, lingvolerna kapablo havis signifan efikon sur la progreso de infanoj en la franca kun fokuso sur formo, sendepende de 'komencingvo'. Fine, elmonro al la travedebla, konstruita 'komencingvo' Esperanto kondukis al ŝajne pli granda homogeneco en atingoj en la franca lingvo je post-testo, sugestante, ke Esperanto eble havas niveligan efikon kiu reduktas diferencojn inter individuaj infanoj.

The Conversation - Karen Roehr-Brackin and Angela Tellier

Mallonga resumo por neakademia legantaro de la esploro, kiu aperas en la ĉapitro supremenciita, inkluzive de fonaj informoj, ligoj al antaŭaj studoj, kaj resumo de eltrovoj.

<https://theconversation.com/how-to-improve-childrens-language-awareness-at-primary-school-46355>

12. Stipendio Buchanan por Doktoriga Instruposteno en Esperanto / Planlingvoj / Lingvoplanado

University of Liverpool

Limdato: 11a de decembro 2017, 16:00 (brita horo)

Resumo pri posteno jam anoncita en la angla <http://www.esperantoresearch.org.uk/site/stipendiary-buchanan-graduate-teaching-fellowship>

Instrua posteno por doktoriganta studento an la fako Esperanto / konstruitaj lingvoj / lingvoplanado (nomita laŭ la nomo de John Buchanan), Fakoj de historioj, lingvoj kaj kulturoj, Universitato Liverpolo.

Stipendio: £14,553 (jare)

La universitato estas renoma en kaj ekster Britio. Esperanto jam delonge konatiĝas en la regiono; inter profesoroj en la universitatoj troviĝas fruaj esperantistoj, kaj en 1930 la kuracisto John Buchanan testamentis monsumon al la universitato por krei postenon de lekciisto pri Esperanto, la unuan fojon, kiam oni tiel agis en la mondo. Poste profesoro William E. Collinson stimulis la studon kaj esploron de la lingvo en la unua duono de la 20a jarcento.

Oni okazigas regule prelegojn en kaj pri Esperanto en la universitato, kiun partoprenas kolegoj el pluraj kampoj. Oni antaŭvidas ke la sukcesa kandidato okupiĝos pri unu el la jenaj esplorkampoj (kiuj rilatas al nunaj interesoj de fakuloj en la universitato) :

- La historio de Esperanto, de konstruitaj lingvoj kaj lingvoplanado (ĉiu kandidatiĝo devas trakti Esperanton, sed oni rajtas ankaŭ kompari ĝin al aliaj (plan)lingvoj);
- La lingvistiko de Esperanto kaj konstruitaj lingvoj;
- La etnografio de la Esperanto-komunumo;
- La interrilato inter Esperanto kaj la historio de ideoj;
- La rolo de Esperanto (aŭ de Esperanto kaj aliaj konstruitaj lingvoj) en edukado;
- Frazologio en Esperanto aŭ en Esperanto kaj aliaj konstruitaj lingvoj.

Oni tamen ja konsideros aliajn projektojn eventuale, ekz. pri interdisciplinaj temoj.

Tiuj kandidatiĝu, kiuj volas doktoriĝi en la Universitato Liverpolo ; ne necesas jama sperto pri instruado. Ne necesas jam paroli Esperanton antaŭ la komenco de la diplomo, sed necesos lerni ĝin kaj, laŭbezone, helpi pri kunordigado de la ateliero ('Masterclass') ĉiun duan jaron kaj pri alia agado. Oni asignos instruadon de Esperanto kiam ĝi bezoniĝos. Oni decidus inter la kandidatoj surbaze nur de la kvalito de la projekto kaj kigrade ĝi kongruas kun, kaj povas subteniĝi de, la nunaj esplorkampoj de nunaj esploristoj en la departemento, kaj de la atingoj akademias de la kandidatoj.

La sukcesa kandidato enskribiĝos kiel parttempa studento, tiel ke ili povu pretigi sian tezon dum samtempa instruado kaj ankaŭ bone pretiĝi por universitata kariero. Oni nomas tian postenon 'Graduate Teaching Fellowship' ('Postdiploma instrua postenulo'). Por demandoj en aŭ pri Esperanto, bv. kontakti atelier@liverpool.ac.uk

Plenajn detalojn en la angla oni trovos ĉe la retejo:

<http://www.esperantoresearch.org.uk/site/stipendiary-buchanan-graduate-teaching-fellowship>

13. *Language Problems and Language Planning: Aktualaj numeroj*

Vol. 40, no. 3/2016

Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj

- The *Académie Française* and monocentricity in a multicultural world. *Aviv Amit*
- Linguistic accommodations and electoral participation: A comparative analysis. *Shauna Reilly and Jeffrey Mark Zimmerman*
- Prospects for indigenous language bilingualism in Mexico: A reassessment. *Norbert Francis*

Interlinguistics / Interlingüística / Interlinguistik / Interlingvistiko

- Slavic constructed languages in the internet age. *Anna-Maria Meyer*

Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj

- Carlo Minnaja and Giorgio Silfer. *Historio de la esperanta literaturo*. *Reviewed by Probal Dasgupta*

- Lid King and Lorna Carson (Eds.). *The multilingual city: Vitality, conflict and change*. Reviewed by Frank Nuessel
- Claude Truchot. *Quelles langues parle-t-on dans les entreprises en France ? Langues au travail dans les entreprises internationales*. Compte rendu par Georges Lüdi
- Florian Coulmas. *Guardians of language: Twenty voices through history*. Reviewed by Probal Dasgupta

Vol. 41, no. 1/2017

Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj

- English in Pakistani public education: Past, present, and future. *Liaquat Ali Channa*
- Language shift or maintenance: The case of the Sindhi language in Pakistan. *Maya Khemlani David, Mumtaz Ali and Gul Muhammad Baloch*
- State contestations in constructions of 1Malaysia: Saying it different to different people. *Mary Varghese and Kamila Ghazali*
- Ethnolinguistic dilemma and static maintenance syndrome: A study of language policies and language perceptions in Pakistan. *Syed Abdul Manan, Maya Khemlani David and Francisco Perlas Dumanig*
- Education, language policy and language use in the Philippines. *Lorraine Pe Symaco*

Rimarkigo pri LPLP 1/2017. Pro redakta eraro, mankis alilingvaj resumoj en numero 1/2017. Ili aperos en posta numero.

14. La nova Tekstaro.com donas pli da Zamenhof, novajn kapablojn, kaj plian rapidecon!

La Tekstaro 3.1 provizas al la uzantoj plurajn plibonigojn. Al tiu unika korpuso de skriba Esperanto ĵus aldoniĝis gravaj pliaj verkoj de Zamenhof el pluraj periodoj. Modernigo de la interfaco nun permesas la samtempan serĉadon laŭ pluraj serĉesprimoj. Tio donas novajn eblojn por eltrovi, kompari, kaj kontrasti detalojn pri la uzado de Esperanto. Ĉio funkcias pli rapide, kaj la manierojn konstrui kompleksajn serĉesprimojn nun estas pli klara.

Tekstaro.com enhavas la plej grandan alireblan korpuson de skribita Esperanto. ‘La Tekstaro’, kiel la ĉiutagaj uzantoj ofte nomas ĝin, estas inter la plej gravaj projektoj, kiujn ESF komisiis. En la jaro 2002, la fama sveda gramatikisto Bertilo Wennergren komencis realigi la projekton. Bertilo estas la aŭtoro de PMEG, la plej grava libro pri Esperanta gramatiko kaj uzado. *La Ondo de Esperanto* nomis lin Esperantisto de la Jaro 2006, kaj UEA honoris lin pro lia estara agado.

Jam dum pli ol 15 jaroj, La Tekstaro helpis al sennombraj esploristoj — Esperantistaj aŭ ne — pristudi ĉiajn aspektojn de skribita Esperanto. Uzantoj povas enketi pri la leksiko, de unuopaj morfemoj ĝis plurvortaj esprimoj kaj parolturnoj, kaj esplori simile detale pri la gramatiko. Eblas eltrovi diversajn

trajtojn de la enhavo kaj stilo de tre diversaj verkoj, ricevi konsilojn pri bona uzo, distingi la Zamenhofajn kaj nezamenhofajn uzojn de vortoj, kaj kontroli la evoluadon de Esperanto trans pli ol 120 jaroj.

Dum la unua fazo koncentriĝis je kolektado, unuecigado kaj prilaboro de tekstoj ekzistantaj en elektronika formo, kaj la dua pri la kompletigo de la tekstoj (interalie, el diversaj Esperantaj periodaĵoj) kaj kreo de uzant-amika interfacio, tiu ĉi, la tria fazo, signife riĉigis la korpuson: multaj skanitaj tekstoj alireblaj ĉe la Aŭstra Nacia Biblioteko estis aldonitaj, tiel ke la tekstomaso nun ampleksas pli ol 4,8 milionojn da vortoj. Inter la plibonigoj estas la kapablo fari samtempajn serĉojn, la kapablo kunigi la serĉojn, elekti/limigi la serĉotajn periodojn, kaj, kompreneble, la kapablo funkcii per diversaj retumiloj kaj aparatoj. En la unuaj du fazoj Bertilo serĉis konsilojn de famaj esperantaj specialistoj: Ilona Koutny, Jouko Lindstedt, Carlo Minnaja, Chris Gledhill kaj Mauro La Torre.

Tiu tria fazo ne estas la lasta fazo por la evoluo de La Tekstaro de Esperanto. Jam komenciĝis la kvara fazo, kiu celas ampleksigon de la enhavo de la korpuso per gravaj verkoj ne-Zamenhofaj (aparte tiuj el la periodo post la Dua Mondmilito) kaj de tekstoj el diversaj nuntempaj gazetoj kaj periodaĵoj, aldone al tiuj de *Monato* kaj *La Ondo de Esperanto*. En la planoj por plia evoluo de Tekstaro estas morfologia markado de la korpuso: t.e., aldono de “signetoj” al la jam ekzistantaj tekstoj, tiel ke en serĉado oni povu eviti la konfuzon inter, ekzemple, la vortoj ‘per/son/e’ – ‘person/e’, ‘per/fid/e’ – ‘perfid/e’, ktp. La tekstaroj de naciaj lingvoj kutime havas tiajn indikilojn, kaj aldoni ilin al La Tekstaro de Esperanto levos la kapablojn kaj la utilon de Tekstaro al eĉ pli granda nivelo.

15. Lastatempaj publikigaĵoj de Bernhard Tuidler (Direktoro, Kolekto por Planlingvoj, Aŭstria Nacia Biblioteko)

Die Sammlung für Plansprachen und das Esperantomuseum der Österreichischen Nationalbibliothek – Geschichte, Bestand und Projekte. En: Bibliothek – Forschung und Praxis 41/2 (2017), 185-192.

Die Lingvo Internacia des Dr. Esperanto (20.07.2017):

<https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/news/die-lingvo-internacia-des-dr-esperanto/>

Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: rekorda nombro de vizitantoj kaj novaj retaj servoj. *Esperanto aktuell* 2 (2017), 5-6.

100-a mortotago de Ludoviko Zamenhof (13.04.2017):

<https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/news/100-a-mortotago-de-ludoviko-zamenhof/>

Zum 100. Todestag des Esperanto-Erfinders Ludwik Zamenhof (13.04.2017):

<https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/news/zum-100-todestag-des-esperanto-erfinders-ludwik-zamenhof/>

„Wie Sie sehen, war Ihre Anregung, Esperanto zu lernen, nicht vergebens“ (13.01.2017):

<https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/news/wie-sie-sehen-war-ihre-anregung-esperanto-zu-lernen-nicht-vergebens/>

Esperanto und Pazifismus vor dem Ersten Weltkrieg (5.11.2016).

<https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/news/esperanto-und-pazifismus-vor-dem-ersten-weltkrieg/>

Nova skanprojekto en la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. *Esperanto aktuell* 2 (2016), 9.

La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. La bibliotekaj katalogoj "Trovanto" kaj "Bildarchiv Austria". *Informilo por interlingvistoj* 1-2 (2016), 12-21.

Eine Sprache für alle. *Info Europa. Informationen über den Donaauraum und Mitteleuropa* 1 (2016), 29-30.

Nia Trezoro. La Viena muzeo. *Ondo de Esperanto* 1 (2016), 16.

Nia Trezoro. La Viena muzeo. *La Balta Ondo*, 22 Januaro (2016). <http://sezonoj.ru/2016/01/trezoro-7/>

La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Historio, havaĵo kaj explorebloj. *Język, komunikacja, informacja* 10 (2015). Numer specjalny Interlingwistyka i Esperantologia. *Language, communication, information* 10. Special issue on Interlinguistic and Esperanto Studies. 184-195. <http://jki.amu.edu.pl/files/JKI%20-%20tom%2010%20-%202015.pdf>

16. Rekoncepti la mondon pere de lingvoj: La rolo de Esperanto en la moderna japana historio

Sesio pri tiu ĉi temo estis organizita de Ian Rapley (Univ. de Cardiff) dum la 15-a Internacia Konferenco de la Eŭropa Asocio pri Japanaj Studoj, Lisbono, 30 aŭgusto – 2 septembro 2017. Gotelind Mueller-Saini (Univ. de Heidelberg) rolis kiel komentarianto. La sesio konsistis el jenaj referaĵoj:

Joseph Essertier (Nagoya Institute of Technology): Inclusive design in Esperanto and romanisation movements in 1930s Japan [Inkluziva dezajno en Esperanto kaj latinigaj movadoj en Japanio de la 1930-aj jaroj]

Joshua Fogel (York University): Why Is Esperanto so popular in Japan? [Kial Esperanto tiel popularas en Japanio?]

Ian Rapley (Cardiff University): Volapük, Pekesaranpan, Zilengo, & Esperanto: the International languages of Meiji Japan. [Volapük, Pekesaranpan, Zilengo, kaj Esperanto: La internaciaj lingvoj de Japanio dum pa periodo Meiji]

Resumoj ĉe: <https://www.nomadit.co.uk/eajs/eajs2017/conferencesuite.php/panels/5450>

17. 20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj, Poznan, Pollando

Fondita en 1997 kadre de la Lingvistika Instituto (Fakultato pri Moderna Filologio) de UAM (Universitato Adam Mickiewicz, Poznano) la **postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj** startigis sian unuan grupon en 1998 kaj daŭre ĉiun trian jaron la sekvan. Nun, post 20 jaroj startis la **7a interlingvistika grupo** kun 21 partoprenantoj el 12 landoj (Ĉinio, Koreio, Turkio, Brazilo, Usono, Francio, Svisio, Germanio, Hispanio, Rusio Kazakio kaj Pollando). La unuan fojon aliĝis azianoj al la studoj, kio certigas pli grandan multkulturecon. La fondajo ESF (Esperantic Studies Foundation) jam de 15 jaroj disponigas kelkajn stipendiojn por la studentoj, kio ebligas pli grandnombran partoprenon en la studoj.

La kursoj havis **riĉan programon** (16-20.09.2017): prof. Humphrey Tonkin gvidis la kurson pri esperanta kulturo prezentante ĝin en vasta historia fono; kontribuis prof. Aleksander Melnikov pri rilatoj inter lingvo kaj kulturo kaj pri personeco de esperantisto; krome d-ro Jukka Pietiläinen pri esperantaj revuoj. Same Humphrey Tonkin enkondukis la esperantan literaturon de la unua periodo koncentriĝante pri la poezio, sekvis lin Tomasz Chmielik kun la prozo de tiu epoko. Eblas aliri fonetikon samtempe interese kaj serioze – tion pruvis prof. Nicolau Dols Salas per sia kurso. Interlingvistiko (en pli malvasta senco) konsistigis la kurson de prof. Vera Barandovská-Frank, kiu jam povis uzi la proveldonon de sia universitata lernolibro pri interlingvistiko. Tiu ĝojiga evento malfermas la serion de lernolibroj de la Studoj fontante el la 20-jara sperto.

La **malnova grupo** kiu startis kiel rekorde granda, ankaŭ fine restis rekorda, ja 11 gestudentoj plenumis sian finekzamenon kun defendo de sia faklaboraĵo el la terenoj de lingvistiko (Karina Oliveira el Brazilo, Bengt Olof Aradson el Svedio kaj Arina Osipova el Rusio), de interlingvistiko (Ida Stria kaj Michał Kozicki el Pollando), el lingvopedagogio (Felix Jimenez Lobo el Hispanio kaj André Staes el Belgio), de komunikado (Johan Derks el Nederlando/Serbio) kaj de literaturo (Rafael Zerbetto el Brazilo/Ĉinio, Fernando Pita el Brazilo kaj Xesus Moïños Pardavila el Hispanio), aldone kiel la 12a Paweł Fischer-Kotowski el la antaŭa grupo.

Kiel kutime, la lingvopedagogia specialiĝo de la tria jaro konsistigas la instruistan trejnadon al kiu eblas aparte aliĝi kaj ricevi la instruistan diplomon de ILEI. Ĉi-foje tri partoprenantoj el Pollando (Krystyna Worobiej, Markéta Wilkus kaj Mariusz Hebdziński) kaj unu franco (Jean-Claude Roy) akiris ĝin post prezento de finlaboraĵo kaj kompleksa ekzameno.

La interlingvistikan sesion kompletigis la **4a Interlingvistika Simpozio** (21-22.09.2017) kun temo: *Rolo de internaciaj lingvoj ekde la epoko de Zamenhof ĝis la nuntempa multkultura mondo* kun celo festi la Zamenhof-jaron kaj la 20-jariĝon de la Studoj. Ĝi estis malfermita por granda publiko kun la oficialaj lingvoj: esperanto, angla kaj pola. Ĉ. 80 partoprenantoj el diversaj landoj traktis lingvopolitikon, planlingvojn kaj lingvistikon, literaturon, movadon kaj instruadon de esperanto en 3 paralelaj sekcioj dum du tagoj, entute okazis 50 prelegoj.

Ĵaude por la malfermo, la rektoro de UAM, prof. Andrzej Lesicki sendis gratulleteron; persone esprimis sian altan taksadon por la 20-jaroj de la Interlingvistikaj Studoj prof. Maciej Karpiński, vicdekano de la Fakultato pri Moderna Filologio; Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA salutis la simpozion en la nomo de UEA. La unua ĉefprelego – Humphrey Tonkin: *Esperanto: A Language Policy Assessment* (Esperanto: lingvopolitika taksado) – estis malfermita por kolegoj de la Lingvistika Instituto. Vera Barandovská-Frank parolis kiel la dua pri la tereno de interlingvistiko kaj prezentis la proveldonon de sia libro pri interlingvistiko. Vendrede matene same okazis du ĉefprelegoj: Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj skizis la 20-jaran historion de la Studoj ligante ĝin al la 50-jara historio de la

universitata instruado de esperantologio kaj interlingvistiko, kiu komenciĝis per la Esperanto-fako de Budapeŝta Universitato en 1966. Sabine Fiedler per amuzaj ekzemploj ilustris kiel funkcias ŝercoj en Esperanto.

Ĵaude vespere okazis impona bankedo kun la partopreno de la malnovaj kaj novaj gestudentoj, instruistoj de la Studoj, prelegantoj de la Simpozio kaj gastoj ĉe bongusta verspermanĝo kaj muzika programo (kontribuis Zuzanna Kornicka kaj la franca grupo La Kompanoj). La gvidanto de la Studoj dankis al la instruista stabo kaj ESF ilian kunlaboron, rememoris pri tiuj kiuj festas specialan naskiĝtagon en tiu ĉi jaro kaj pri la ĉi-jare forpasinta Zbigniew Galor kies kontribuo al la Studoj restas neforgesebla. Ŝi gratulis al la gestudentoj, kiuj sukcese finis siajn studojn...

Semajnfine la kunesto daŭris dum la tradicia kultura festivalo Arkones, kun prelegoj, muziko, filmoj.

Ĝis revido en februaro

Ilona Koutny

18. Nuna stato kaj evoluo de la instruado de Esperanto kiel internacia lingvo en la tuta mondo: Universitata Simpozio. Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj, Seulo, Koreio, julio 2017

Oni prezentis la jenajn referaĵojn dum la simpozio:

- Mireille Grosjean (Switzerland): Esperanto instruado-edukado en tutmonda skalo
- Toshihiro Yamasita (Japan): Panorama metodo
- Gábor Márkus (Hungary): La lingvo de espero
- Ronald Glossop (USA): Pri la organizaĵo "Infanoj ĉirkaŭ la mondo"
- Xiaofeng Gong (China): Konkiza historio de la Esperanto-movado en Ĉinio
- Ruben Fernandez Asensio [Spain]: Lingvistiko, instrumentoj kaj Esperanto – ne forlasu la plenkreskulojn!
- Dimitriy Shevchenko (Russia): Esperanto-edukado kaj ĝiaj perspektivoj en Rusio
- Maria Butan (Romania): Instruado kaj lernado de Esperanto en Rumanio
- Dalia Pileckienė (Lithuania): Esperanto-edukado kaj ĝiaj perspektivoj en Litovio
- Katalin Kováts (Hungary/Netherlands): La situacio de instruado de Esperanto en lernejoj iam kaj nun.

19. AIS San Marino sesiis en Varsovio, 10-15 septembro 2017

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino okazigis sian 34-an Sanmarinecan Universitatan Sesion inter la 10-a kaj la 15-a de septembro 2017 en Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto. Sesiĝo estis la Varsovia Lernejo pri Direktado – Altlernejo (WSZ–SW), kies konstruaĵo iam estis la pola sekretario de Ligo de Nacioj.

La solena inaŭguro okazis en la aŭlo de la altlernejo en ĉeesto de la rektoro Waldemar Gajda, de la dekanano Krzysztof Zaczek-Zaczynski kaj de prof. Jacek Czaputowicz, reprezentanto de la ministrejo pri eksteraj aferoj. Post saluto de la rektoro kaj de la AIS-profesoro Christer Kiselman estis prezentita video-registrita saluto de Prof. Amri Wandel, prezidanto de AIS. Poste Reinhard Fössmeier donis superrigardon pri la rigardo kaj la evoluo de AIS, prelegis pri la Unua Libro kaj pri ecoj de pliaŭgulaj lernantoj de Esperanto. En la kursa programo de SUS 34 okazis tri sciencaj kursoj el matematiko, filozofio kaj natursciencoj. Pluraj SUS-anoj prezentis temojn el sia laboro per prelegoj. La lastan SUS-tagon okazis ekzamenoj pri la kursoj.

Fine de SUS 34 reprezentantoj de WSZ–SW kaj de AIS subskribis interkonsenton pri estonta kunlaboro. WSZ–SW instalos Esperanto-kurson por siaj studentoj. AIS faros proponojn, en kiuj fakoj ĝi povos subteni WSZ–SW per kursoj kaj docentoj kaj pri kiuj fakoj eblos komunaj esplorprojektoj.

En la solena fermo AIS invitis al SUS 35, kiu okazos fine de aŭgusto 2018 kune kun la 85-a Itala Esperanto-Kongreso en San-Marino.

20. Pli ol 70 Esperanto- periodaĵoj nun plene traserĉeblaj

La kompletaj tekstoj de multaj jarkolektoj de pli ol 70 Esperanto-periodaĵoj, ekzemple tiuj de la revuo Esperanto de 1905 ĝis 1946, estas nun plene traserĉeblaj en la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Bernhard Tuidler, estro de la kolekto en Esperanto-Muzeo en Vieno respondas la demandojn de Libera Folio. La retan adreson vi trovas en la artikolo ĉe: <http://www.liberafolio.org/2017/10/02/historiaj-periodaĵoj-nun-rete-traserceblaj/>

Eldonas Ipl: Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Ĉi tiun numeron redaktis: Humphrey Tonkin kaj Yevgeniya (Ĵenja) Amis. Redakcio (kontribuoj, ricevado de la bulteno, k.s.): ipi@esperantic.org. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj.
